

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 106, Aŭgusto 2019



La Julio finiĝis. Por nia movado ĝi estis treege fruktodona: okazis la 30-a Konferenco de REU, kiu akceptis plurajn decidojn kaj elektis novan Estraron kun nova Prezidanto – Aleksandr Lebedev. La Konferenco pasis enkadre de TEMoj – aranĝo en Tiĥvino, dediĉita al 70-jariĝo de Mikaelo Bronŝtejn. Pluraj el ni partoprenis en diversaj internaciaj aranĝoj, unuavice en BET en Panevejo kaj UK en Lahtio. Certe, en nia Bulteno ni reflektos ĉiujn oficialajn decidojn kaj ĉiujn rezultojn de la Konferenco kaj rememorojn pri eventoj – ion en tiu ĉi numero, iujn en la sekva.

Sed komencos ni tiun ĉi numeron de la gratulo al nia kara jubileanto, al kiu tre multaj el rusiaj esperantistoj tia- aŭ alimaniere ŝuldas sian esperantistecon.

Tiu ĉi numero enhavas multe da “oficialaĵoj”, do havas “bultenan” aspekton. Tamen la Estraro esperas, ke nia Bulteno finfine ricevos novan nomon, kiu pli konvenas al ĝia nuna stato, kaj la sekva numero ĝin jam akceptos.

Estraro de REU

Jubileo

La 15-an de Julio 2019

fama rusia esperantisto – instruisto, movada organizanto, aŭtoro de lernolibroj, laŭ kiuj studis Esperanton kaj Esperanto-kulturon pluraj generacioj de rusiaj kaj tutmondaj lernantoj de ĉiuj niveloj, akademiano

Boris Grigorjeviĉ Kolker

fariĝas 80-jaraĝa.

Estraro de REU kaj la tuta nialanda kaj tutmonda esperantistaro sincere gratulas la elstaran kaj senlacan batalanton por la verda afero kaj internacilingva kulturo okaze de la jubileo kaj deziras al li pliajn sukcesojn sur ĉiuj kampoj de lia vivo kaj agado!






1949. Boris estas dua de dekstre

Boriso (Boris Grigorjeviĉ) KOLKER (ruse *Борис Григорьевич Колкер*; naskiĝis la 15-an de julio 1939 en Tiraspolo, Moldava Aŭtonoma Soveta Socialista Respubliko, Sovetunio) estas instruisto de lingvoj kaj tradukisto, esperantologo, aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj por diversaj niveloj. Rusiano kaj sovetiano, ekde 1993 - usonano, loĝanta en Klevlando, subŝtato Ohio.

Esperantistiĝis en 1957. Doktoro pri lingvoscienco, defendinta disertacion pri esperantologia temo. Aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj, interlingvistikaj artikoloj kaj recenzoj. Dank' al granda populareco de lia libro *Vojaĝo en Esperanto-lando*, kiu estas samtempe perfektiga kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo, li estas konata al multaj kiel ĉiĉerono en Esperanto-lando.

Membro de la Akademio de Esperanto ekde la jaro 1992. Honora Membro de UEA (Universala Esperanto-Asocio). Honora membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Membro de la Akademio Literatura de Esperanto (ALE). Kunredaktoro de la internacia gazeto "Monato". Dum du jardekoj gvidis amasan korespondan kurson en Rusio, en kiu diplomitiĝis preskaŭ 900 personoj. Instruis Esperanton ĉe usonaj universitatoj en San Francisco kaj Hartford. Nun gvidanto de la Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK).

En diversaj tempoj kunfondinto kaj kungvidanto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), respondeculo pri Esperanto-instruado en Sovetunio kaj Rusio, komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), membro (ekde la jaro 1959), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de ILEI/UEA. Prelegis kaj publike parolis en pluraj Universalaj Kongresoj de Esperanto (ekde la 48-a UK en Sofio en la jaro 1963), regisoris la Kongresan temon en la 85-a UK en Tel-Avivo (2000).



Disertacio

Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto. (ruse *Вклад русского языка в формирование и развитие эсперанто.*) Moskva: Akademija Nauk SSSR, Institut Jazikoznanija, 1985. - 23 p. Referaĵo de doktoriga disertacio pri lingvoscienco, ruslingva.

Lernolibroj




- *Metodikaj materialoj por internacia lingvo esperanto.* (Методические разработки по международному языку эсперанто для курсов) 1978.
- *Vojaĝo en Esperanto-lando.* *Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo.*
- *Lernolibro de la lingvo Esperanto. Baza kurso.* (Учебник языка эсперанто. Основной курс)
- *Esperanto en 16 tagoj. Ekspres-kurso.* (Эсперанто за 16 дней)
- *Internacia lingvo Esperanto. Plena lernolibro.*



Vortaro

Esperanta-rusa vortaro: ĉirkaŭ 3000 vortoj. - Moskva: Impeto, 1993. - 53 p. ISBN 5-7161-0002-3.

Artikoloj



- *Ĉefaj strukturaj principoj de Esperanto.* - En: *La arto labori kune*. Festlibro por Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 2010.
- *Enigmoj de Ludoviko Zamenhof*
- *NIA Vilnuso kaj ILIA Jerusalemo*
- *Claude Piron kaj "Vojaĝo en Esperanto-lando"*
- *Kiam mi tradukis divenante*
- *Interlingvistiko kaj interlingvistikaj esploroj en Sovetunio.* - En: *Esperanto: la internacia lingvo - sciencaj aspektoj*; (Berlin: Kulturligo de GDR, Centra Laborrondo Esperanto, 1979. - 237 p.) p. 74 – 78.
- *Kontribuo de la rusa lingvo al la verba sistemo de Esperanto.* - En: *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo: II Esperantismo*; (La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. - 766 p.) p. 315 – 325.

- *Vklad ruskogo jazika v strukturu Esperanto* (ruslingva – *Kontribuo de la rusa lingvo al la strukturo de Esperanto*). - En: *Interlinguistica Tartuensis*, 3; ([Tartu](#): Tartuskij Gosudarstvennij Universitet, [1984](#). - 182 p.) p. 74 – 108, resumo en Esperanto.
- *Vklad ruskogo jazika v leksiku Esperanto* (ruslingva – *Kontribuo de la rusa lingvo al la leksiko de Esperanto*). - En: *Interlinguistica Tartuensis*, 5; ([Tartu](#): Tartuskij Gosudarstvennij Universitet, [1988](#). - 183 p.) p. 74 – 91, resumo en Esperanto.
- [Pri "Vojaĝo" por la legantoj de "Komencanto"](#), *Komencanto*, [2003](#) (n-ro 3)
- [Lasta artikolo de L. L. Zamenhof pri judaj temoj](#), *Israela Esperantisto*, julio [2004](#) (n-ro 140)
- [Свободная эмиграция из СССР подготовлена в Кливленде](#) (Libera elmigrado el Sovet-Unio estis preparita en Cleveland.)
- [Поправка, изменившая нашу судьбу](#). (Amendo, kiu ŝanĝis nian sorton.)

Laŭ https://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Kolker

NI VIVU LONGE, FELIĈE KAJ FELIĈIGE, NI ĜUU NIAN ESPERANTISTECON KAJ NIAN MALFERMITECON AL LA MONDO!

INTERVJUO DE BORIS KOLKER POR FORMOZA FOLIO

- Ĉu vi povus prezenti vin?

= = Mia nomo estas Boris Kolker. Mia kromnomo estas Ĉiĉerono en Esperanto-lando.

- Kiun profesion vi havas?

= = Pliparton de mia vivo mi laboris kiel tradukisto de scienca kaj teknika literaturo, ĉefe pri naftoindustrio. Antaŭ tio mi instruis la lingvosciencan, la francan kaj latinan lingvojn en universitatoj. La lastan jardekon, post la elmigro en Usonon el Rusio, mi laboris kiel oficej-estro en komputila kompanio.

- Kiam vi estis knabo, kiu estis via ambicio por via plenaĝa vivo?

= = Mi revis fariĝi ĵurnalisto.

- Kio estas via plej forta memoro pri infaneco?

= = Estis oktobro de la 1944-a jaro. La 2-a Mondmilito ankoraŭ daŭris. Ni revenis el Uzbekio en la liberigitan urbon Kiŝinevo (Moldavio, Sovet-Unio). Malfrua vespero. Neniu lumo en stratoj, laŭlonge de kiuj staras ruinoj de bomb-detruitaj domoj. Mi estas 5-jaraĝa.

- Kio estis la unua libro, kiun vi legis en Esperanto?

= = "Petro". Eldonejo SAT. Parizo. 1956 (8a eldono). Internacia lernolibro por laboristoj. Plene en Esperanto.

- Kio estas via plej ŝatata libro?

= = "Kredu min sinjorino!" de Cezaro Rossetti.

- Kiu estas la libro, kiun, laŭ vi, ĉiuj esperantistoj bezonas legi?

= = Ĉu estas iu dubo? Certe, "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta Kulturo"! Ĝia tralego egalas al tralego de biblioteko.

- Kiam kaj kiel vi komencis verki?

= = En aŭgusto 1960, dum la 2-a Balta Esperanto-tendaro en Estonio Vytautas Ŝilas kaj mi tradukis el la rusa en Esperanton la

tekston de tiam ege populara kanto "Indonezio".

- Kiel venis al vi la ideo verki lernolibrojn de Esperanto?

= = En februaro 1970 mi lanĉis mian amasan korespondan kurson de Esperanto, en kiu dum 23 jaroj diplomigis preskaŭ 900 personoj el ĉiuj regionoj de Sovet-Unio. Ĉar dum dudeko da jaroj Esperanto estis malpermesita en Sovet-Unio, mankis lernolibroj por ruslingvanoj. Tial dum du jaroj mi uzis por tiu kurso la

supremenciitan

lernolibron "Petro".

Ĉar mi laboris kiel

interpretisto-tradukisto kun teknikistoj de la franca

aŭtomobila kompanio

"Renault", kiu

konstruis motor-uzinon

en nia urbo Ufa, mi

sukcesis havigi al mi

latinliteran tajpilon

(nekredebla maloftaĵo

tiutempe!). Mi

retajpdis la lecionojn kaj sendadis ilin al miaj lernantoj. Fine mi decidis mem verki lernolibron – ja laŭdiplome mi estis instruisto de lingvoj. Mi faris tion en la 1972a jaro kaj sekvajare mi sukcesis publikigi la lecionojn en la regiona junulara ĵurnalo. Dum pli ol 40 jaroj tiu lernolibro estis perfektigata kaj reeldonata kaj nun estas konata kiel Plena lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj.

- Ĉu vi havas kontakton kun viaj legantoj?

= = Jes, mi estas en kontakto kun centoj da miaj lernintoj kaj legantoj.

- Iuj aŭtoroj havas ĉiam oportunan kajeron, en kiun ili notas ideojn kaj frazojn, kiuj trairas iliajn kapojn. Iuj skribas sur papero unue kaj nur poste tajpas la tekston. Kaj vi, ĉu vi havas skribo-



ceremoniaron?

= = Iam mi skribis notojn sur paperon. Jam delonge mi tajpas ilin en mian komputilon. Tial, kiam venas tempo por prepari novan eldonon de iu mia lernolibro, mi jam havas listegon kun eventualaj modifoj.

- Ĉu vi pensas ke skrib-talento venas el disciplino aŭ naturo? (Do you think that writing talent is nurture or nature?)

= = Verŝajne, el ambaŭ.


- Kio estus via unua konsilo por iu, kiu dezirus esti verkisto?

= = Rememoru iun tre interesan epizodon en via vivo, priskribu ĝin kaj konigu al viaj amikoj.

- En "Vojaĝo en Esperanto-lando" oni povas legi tekstojn de multaj gravaj Esperanto-verkistoj. Ĉu vi renkontis multajn el ili?

= = Jenajn aŭtorojn de tekstoj mi renkontis: William Auld, Gaston Waringhien, Claude Piron, Majorie Boulton, Tibor Sekelj, Eŭgeno Bokarjov, John Wells, Trevor Steel, Hilda Dresen, Louis Beaucaire, Humphrey Tonkin, Spomenka Štivec, Istvan Nemere, Julian Modest, Vladimiro Samodaj, Nadija Andrianova, Mikaelo Giŝpling, Mikaelo Bronŝtejn, Arthur Baur, Nikola Aleksiev, Den Drown, Sergej Kuznecov, Nina Cvileneva. Legado de iliaj verkoj kaj komunikiĝo kun ili (persona kaj koresponda) riĉigis mian vivon.

- Vi verkis kelkajn famajn Esperantajn lernolibrojn por studentoj de malsamaj niveloj. Ĉu vi foje pensas pri verki romanon, fikcion, verkon de teatro?



= = Mi pensis verki tre originalan libron pri Ludoviko Zamenhof kaj kolektis ideojn kaj materialojn pri tio. Sed mi ne trovis tempon. Kaj nun jam estas malfrue okupiĝi pri tio.

- Vi estas membro de la Akademio de Esperanto; kion ĝi reprezentas por vi?

= = Mi estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en la 1992-a jaro kaj reelektita por du pliaj 9-jaraj periodoj. Mi kunlaboras en jenaj sekcioj: Ĝenerala Vortaro, Kontrolado de lerniloj kaj Lingva Konsultejo; la lastan mi gvidis dum 3 jaroj. La Akademia laboro ne estas tre rimarkebla ekstere, sed grava por la evoluo de Esperanto. Mi enmetas en ĝin mian kompetentecon.

- Vi ankaŭ estas membro de la Akademio Literatura de Esperanto (ALE); ĉu vi povas diri al ni kelkajn vortojn pri la celo de ALE?

= = Ĝi estis fondita en la jaro 1983. Ĝia celo estis stimuli kaj plialtniveligi la Esperantlingvajn verkadon kaj kritikadon, kaj agnoskigi la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperanto-movado. Ŝajnas al mi, ke en la lastaj jaroj ALE estas malpli aktiva.

- Vi verkis doktorigan disertacion pri "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto." Ĉu vi pensas, ke kelkaj kulturoj aŭ lingvoj havis ŝlosilan rolon

en la apero kaj evoluo de Esperanto?

= = Mi povas respondi la demandon pri la apero de Esperanto. Ĝia leksiko estas bazita sur internaciaj elementoj de jenaj gravaj eŭropaj lingvoj laŭ jena ordo: franca, angla, germana kaj rusa. En la formiĝo de Esperanto la rusa lingvo ludis la rolon de la decida kontrola lingvo: en Esperanton eniris unuavice tiuj eŭropismoj, kiuj iĝis elementoj de la rusa lingvo kaj plej ofte en la formo, kiun ili akiris en la rusa lingvo. Al la evoluo de Esperanto influis unuavice kulturoj kaj lingvoj de elstaraj Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj. La unua periodo estis la rusa, unuavice danke al tio, ke Ludoviko Zamenhof kaj unuaj verkistoj loĝis en la Rusa Imperio. Ege grava estis la franca periodo.




- En "Vojaĝo en Esperanto-lando" oni povas legi pri la diktatora regado de Stalin. Ĉu vi pensas, ke junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kion homoj kiel Hitler, Stalin kaj probable diktatoroj en aliaj landoj faris al esperantistoj?

= = Verŝajne, junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kvankam estas facile alirebla la brila libro de Ulrich Lins "La danĝera lingvo". Tamen pli gravas ne la historio, sed la realo: diskonigo, lernado kaj diversspeca utiligo de Esperanto.

- Vi estis kunfondinto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kaj kunlaboris


al multaj gravaj projektoj kaj agadoj. Ĉu vi pensas iam verki biografion, kie vi rakontus al ni pri ĉi tiuj spertoj?

= = Mia amiko Vladimir Samodaj verkis tiaspecan libron sub la titolo "Esperanto kaj vivo", por kiu mi verkis antaŭparolon. Estus alloge, se ankaŭ mi rakontus pri mia vivo libroforme. Sed, ŝajnas, ke mia malpliiginta energio ne sufiĉos por tiu laboro. Tamen iujn interesajn epizodojn el mia vivo mi rakontis en kelkaj publikigitaj rakontoj kaj intervjuoj.



- Ĵak le Puil kantas “Kiam regos am’ sur ter’ “, traduko de “Quand les hommes vivront d’amour”, kanto de Raymond Lévesque el Kanado. Li diras: “Kiam regos amo sur tero, Trobadoriĝos la soldato; for la militon, for la karceron! Sed ni jam estos mortaj, frato!”. Ĉu vi pensas, ke iam amo aŭ paco regos sur tero? Ĉu vi pensas, ke venos la fina venko?
 == La amo kaj la paco, kaj ankaŭ la fina venko de Esperanto vivu unuavice en nia koro! Ni vivu longe, feliĉe kaj feliĉige, ni ĝuu nian esperantistecon kaj nian malfermitecon al la mondo!

*Boris Kolker,
 civitano de Esperanto-lando
 Formoza Folio, N-ro 19*



Honore al 80-jariĝo de Boris Kolker Usono emisiis monbileton kun lia portreto.
 Kiu ne kredas, rigardu la bildon! ☺

Esperanto en rusia radio

Radio “Sputnik”

En Jutubo spekteblas intervjuo kun Georgij Kokolija kaj Aleksandr Piperski, kiun faris la radio «Sputnik» (la posteulo de «Golos Rossii») dediĉe al la dato: <https://www.youtube.com/watch?v=DmbAsAtiIZE>

Estas bonega intervjuo. Prepariteco de la ĵurnalistino estis superba. Mi ne memoras vidi tioman interesiĝon de la eksteresperantuja ĵurnalista pri progresigo de Esperanto. Kaj eble eĉ tiom trafajn kaj klarajn respondojn, kiujn donis Aleksandr Piperski. Modela sinesprimo, senduba simpatio al Esperanto ĉe ideala objektiveco.

Garik, laŭ mi, perdis kelkajn okazojn montri Esperanton pli ol hobiaj kaj suflori, kiel eblas helpi al evoluo de la lingvo en Rusio. Bedaŭrindas. La okazo estis unika.

Radio de Rusio

La 28.07.2019 okaze de Esperanto-Tago Aleksandro Lebedev, antaŭ 10 tagoj elektita nova REU-prezidanto, kaj konata Esperanto-bardo Mikaelo Povorin sukcese respondis demandojn pri Esperanto en la etero de "Радио России" ("Radio de Rusio") en la elsendo "Bona komenco". Mikaelo ankaŭ kantis unu el siaj famaj kanzonoj «Velura sezono». Krome, Mikaelo menciis, ke lia unua lernilo en Esperanto estis la kurso de Boris Kolker en la revuo “Kemio kaj vivo”.

Aŭskultu la unuan epizodon de la programo ĉi tie:

<http://www.radiorus.ru/brand/63552/episode/2188779>



Irina Gonĉarova

Decidoj de la 30-a Konferenco de REU (setlejo Carina lago, Tiĥvina distrikto, la 17-a – 18-a de julio 2019)

1. Danki al s-ro Vladimir Opletajev (Surgut) pro la modela plenumo de la taskoj de estrarano de REU pri instru-metodika laboro kaj pro ĝenerala ordigo de laboro de la Estraro de REU en la oficperiodo 2017–2019.
Peti en la nomo de la Konferenco s-ron Vladimir Opletajev fariĝi konsilanto de la Estraro.
2. Danki al s-ro Viktor Aroloviĉ (Moskvo) pro la modela plenumo de la taskoj de REU-komisiito kaj elekti lin Komisiito de REU pri la dokumentaro de REU en la oficperiodo 2019–2021.
3. Konfirmi la „Regularon pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №3 de la Estrara decido, 09.09.2017).
4. Konfirmi la „Regularon pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №9 de la Estrara decido, 14.12.2017).
5. Konfirmi la „Regularon pri «Eminente rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)»“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №14 de la Estrara decido, 20.11.2018).
6. Aprobi la agadon de la Estraro pri la plenumo de la decidoj de la 29-a Konferenco de REU.
7. Aprobi la raporton de la Estraro pri la agado kaj financoj kaj taksu la laboron de la Estraro de REU en la oficperiodo 2017–2019 kontentiga.
8. Aprobi la raporton de la Kontrol-revizia Komisiono de REU kaj taksu la laboron de la Kontrol-revizia Komisiono en la agadperiodo 2017–2019 kontentiga.
9. Konsideri la Estraron de REU elektita por la oficperiodo 2019–2021 en la persona konsisto:
Aleksandr Lebedev (Jegorjevsk) — prezidanto;
Svetlana Smetanina (Moskvo) — 1-a vicprezidanto;
Nikolaj Gudskov (Moskvo) — 2-a vicprezidanto;
Irina Gonĉarova (Odincovo) — membro de la Estraro;
Aleksandr Mitin (Niĥnij Novgorod) — membro de la Estraro.
10. Konsideri la Kontrol-revizian Komisionon elektita por la oficperiodo 2019–2021 en la persona konsisto:
Gennadij Basov (Tomsk) — prezidanto;
Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangelsk) — membro de la Komisiono;
Sergej Ĵilejkin (Sosnovoborsk) — membro de la Komisiono.
11. Eligi el la membroj de REU personojn, kun kiuj mankas ajnaj kontaktoj dum 5 jaroj aŭ pli, kaj ne eblas ekscii pri ilia vivo aŭ forpaso. Komisiu al la Estraro uzi tiun ĉi principon en la kuranta agado.
12. Komisiu al la Estraro verki kaj publikigi ĝis novembro 2019 Regularon pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU.
13. Komisiu al la Estraro krei kaj publikigi ĝis novembro 2019 kompleksan laborplanon de la Estraro de REU por la oficperiodo 2019–2021.
14. Komisiu al la Estraro de REU organizi la tradician someran tendaron de rusiaj esperantistoj «Rusiaj Esperanto-tagoj» (RET) en 2020.
15. Esplori la eblon pri organizo de la Internacia blindula kongreso en 2020 en Samaro.
16. Komisiu al la Estraro de REU organizi en la jaro 2020 aktivul-maturigan trejnadon — rusan seminarion pri aktivula maturigo (AMoRU), difini ĝian temon kaj diskutigi ĝin inter la membroj de REU.
17. Elekti s-inon Svetlana Smetanina Komitatano A de UEA por la periodo 2019–2022.
18. Peti al Aleksandr Osokin igi Aleksandr Mitin administranto de la listoj REU-agado kaj Esperanto-rus-informoj kun maksimumaj rajtoj.

Protokolo de la 30-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio **Tiĥvin, 17–18.07.2019** **(enkadre de TEMoj-2019)**

La unua kunveno (17.07.2019, 09:30)

17.07.2019 09:30 Malfermo de la Konferenco.

I. Organizaj eroj

Prezidanto de REU Svetlana Smetanina salutis la partoprenantojn.
Malfermo de la Konferenco.

Elekto de kunvenigvidanto. Elektita A. Lebedev — unuanime.

Elekto de protokolanto(j). Elektitaj N. Cvileneva, Ju. Karcev — unuanime.

Elekto de kalkulkomisiono. Elektitaj G. Basov, L. Ŝapoŝnikova — unuanime.

Kontrolo de kvorumo. Partoprenas 18 plus 1 distance = 19 (el 22 aliĝintoj).

La duono estas 19/2 = 9,5; do la kvorumo por decidoj estas 10.

Proponita tagordo estas akceptita — unuanime.

2. Raporto de la Estraro kaj komisiitoj

2.1. Raporto de la Prezidanto

2.2. Raporto pri la plenumo de la decidoj de la 29-a Konferenco:

- laŭdi la agadon de MEA MASI — plenumita;
- apogi E-ekzamenon — plenumita;
- okazigi en 2019 antaŭkongreson aŭ postkongreson lige kun UK — ne plenumita, ĉar UEA tion decidis mem;
- apogi AMo-seminaron — plenumita;
- daŭrigi la agadon pri eternigo de memoro pri LLZ — ne estas plenumita, V. Seguru nenion raportis pri tio;
- krei fonduson pri la vortaro de B. Kondratjev — plenumita;
- subteni laboron de Ja. Kikavec — la situacio estis esplorita de la Estraro;
- esplori eblojn pri RET-2018 — la situacio estis esplorita, **el du ebloj (apud Taganrogo kaj apud Ŝuja) estis elektita loko apud Ŝuja pro signife pli bonaj financaj kondiĉoj, tie oni ne postulis tro grandan antaŭpagon.**

2.3. Raporto de N. Gudskov pri eldona agado:

- du personoj sendis proponojn pri la nomo de BdR;
- estis lanĉita literatura suplemento;
- estis eldonitaj kelkaj broŝuroj kaj libroj.

Okazis diskuto pri la temo.

Gonĉarova: Estas grandioza laboro. Nikolao kaj Svetlana laŭdendas.

Smetanina: Estas ideo kunigi BdR kaj Literaturan suplementon.

Aliaj homoj ne subtenis la proponon pri kunigo.

V. Melnikov: gravas, ke en la retejo devas esti «Cerbe kaj Kore» — ĝi estas valora por ĉiuj.

2.4. Raporto de I. Gonĉarova pri regiona agado

I. Gonĉarova: komence mi devas diri pli ĝeneralajn aferojn, antaŭ ol raporti. Se ni ne ŝanĝos nian rilaton al rusia esperantistaro, se ni daŭre apartigos REU de esperantistoj de la lando — ni fiaskos. La situacio ne estas tiom pesimisma, sed estas sufiĉe ne bona. Ne faru limojn inter esperantistoj kaj REU. Ĉu membro aŭ ne membro — ne gravas.

N. Gudskov: homoj simple ne volas partopreni, ili volas uzi servojn de REU, sed esti ekstere. Ne volas esti membroj kaj ĉeesti kunsidojn.

A. Mitin: sed kion faras REU por apartiĝo? Male, mi vidas, ke Ŝevĉenko mem apartiĝis de REU.

V. Melnikov: mi konstante aŭdas plendojn — kial homoj ne volas aliĝi al REU? Mi demandas: kion donas membreco en REU al ordinara esperantisto? Nenion.

Smetanina: kial organizo devas ion doni? Komence homo devas subteni la organizon, kaj poste jam postuli.

Gonĉarova: ne gravas, ĉu la homo membras en REU aŭ ne. Gravas, kion la homo faras. Ekzistas en la regionoj elstaraj homoj, sed ni ne scias pri ilia agado. Mi proponas kompili adresaron (laŭ sperto de SEJM), ke ĉiu aktivulo eksci, kiu estas en lia regiono, pri interesoj, deziroj ktp. Nun estas 8 grandaj regionoj. 3 reprezentantoj respondis nenion. Do, pri 3 regionoj estas konata nenio.

A. Mitin redemandas: tamen, kion konkrete faras REU por «apartiĝi»?

I. Gonĉarova skize rerakontis la raporton pri regionoj.

T. Loskutova: organizante la karavanon, mi trovis esperantistojn en Ulan-Ude. Aktiviĝis esperantistoj en Jaroslavlj.

V. Sapoŝnikov aldonis informojn pri siberia Esperanto-movado: estas kluboj en Krasnojarsko, Novosibirsko, Novokuznecko, Tomsko, Barnaulo. Okazas renkontiĝoj. Konkludoj de Sapoŝnikov:

- 1) Lokaj reprezentantoj de REU devas esti en plejmulto de grandaj urboj de nia lando.
- 2) Ĉefa manko de la movado surloke, ke ni ne faras tri unuecajn taskojn. Ni devas samtempe okupiĝi pri, unue, popularigo, aŭ propagando, due, pri varbado kaj instruado de Esperanto, trie, pri edukado de novaj esperantistoj.
- 3) Ni devas labori kun ĉiuj esperantistoj, sendepende de la membreco.
- 4) Reorganizi la kluban konkuradon. Partoprenu ĉiuj grupoj kaj kluboj, ĉu REU-anoj, ĉu ne. Estu premiataj la unuaj 3 lokoj.
- 5) Kriterioj. Klubo estas klubo (sed ne disaj esperantistoj), se estas:
 - ne malpli ol 3 membroj;
 - regulaj kunvenoj;
 - certaj loko kaj tempo de la kunvenoj;
 - gvidantaro de la klubo;
 - plano kaj komuna agado.

Demandoj.

S. Ĵilejkin: Ĉu utilas klubkunvenoj?

V. Sapoĵnikov: Oni kunvenas por 1) praktiki Esperanton, 2) uzi, utiligi Esperanton por paroli pri Esperanto-agado.

S. Ĵileĵkin: Mi opinias, ke utilas, ĉar dum babilado aperas novaj ideoj.

T. Loskutova: ĉu vi provis kontakti esperantistojn el Fora Oriento?

V. Sapoĵnikov: jes, mi kontaktis kun J. Bojĉin kaj G. Ŝlepĉenko. Mi invitis ilin al niaj aranĝoj.

Smetanina: Kion signifas esti oficiala reprezentanto de REU en ĉiu urbo? Se homo ofte kontaktas oficialajn instancojn, tiu homo devas havi paperan konfirmlon por pruvi rajton kontakti je la nomo de REU. Kiam estas bezonata, ni faras tiujn konfirmilojn. Tio donas eĉ eblecon instrui en lernejoj.

Smetanina: Aldona komento: mi proponis al KRESKO organizi RET-on en Siberio en 2020. Jen vi vidas informilojn pri ĝi.

2.5. Raporto de V. Opletajev pri instru-metodika agado

V. Opletajev ne sukcesis veni al la Konferenco; la preparita de li raporto estis voĉlegita de S. Smetanina.

S. Smetanina aldonis, ke V. Opletajev volas ekŝiĝi el la Estraro, kaj tiu posteno estas vaka.

2.6. Raportoj de A. Mitin pri membraro kaj retaj servoj

A. Mitin interalie rakontas pri situacio pri dumvivaj membroj, kun kelkaj el kiuj tute mankas kontaktoj dum longa tempo. Pri iuj ne estas informoj, ĉu ili vivas aŭ jam ne.

S. Smetanina: estas nia kulpo, ke ni ne scias pri lokaj aktivuloj. Sed ni devas decidi, kion fari pri tiu listo de dumvivaj membroj, kiuj ne montras vivsignojn.

N. Gudskov: estas propono konsideri membron perdinta post 5 jaroj. Se dum 5 jaroj esperantisto ne aktivigas — ellistigi lin/sin (certe post provoj rekontakti). Necesas zorge formuli tiun amendon, eblas komisi tian al V. Aroloviĉ.

Voĉdono: ĉiuj estas por;

A. Mitin: estas ankaŭ problemo, ke ni ofte ricevas simple liston de klubanoj — sen patronomoj, aĝo, adreso, retadreso. Necesas postuli havi tiujn informojn.

Kafopaŭzo

2.7. Raporto de A. Lebedev pri la retejo

Demandoj kaj komentoj.

N. Gudskov: ne ĉiuj informoj en la retejo estas facile troveblaj. Ĝi havas komplikan strukturon.

I. Gonĉarova: ĉu multaj homoj uzas la retejon de REU por rakonti pri siaj kluboj?

A. Lebedev: ne multaj, sed kelkaj uzas (ekzemple, J. Bojĉin).

I. Gonĉarova: ni devas stimuli tion.

2.8. Financaj raportoj de A. Lebedev

Demandoj pri Kondratjev-fonduso:

I. Gonĉarova: Ĉu ni raportas nur pri enspezo, ne pri la elspezo? REU estas nur peranto por ke homoj kontribuu. Oni ne rajtas postuli raporton pri la elspezo de la mono.

G. Basov: ni povas ne postuli, sed peti tiun informon.

I. Gonĉarova informis pri la stato de la laboro pri la vortaro.

Demandoj pri la financa raporto:

V. Melnikov: En la raporto ne estas indikita, por kiu celo estas uzita la mono, nur estas skribita «al la Prezidanto». Sed por kio?

G. Basov: pro diversaj kaŭzoj ni ne havas normalan librotendonon, kio multe kostas. Ni havas nur kasiston. Se ni volas havi librotendonon, ni devos dekoble plialtigi la kotizon.

S. Smetanina: oni pagas 250 rublojn jare kaj postulas multegajn raportojn, sed, ekzemple, mia lasta registrita letero al ministerio kostis 190 rublojn.

I. Gonĉarova: sed estas tre simpla afero. Kiam vi elspezas, vi notu, por kiu celo. Estas ja vi, kiu devas tion fari, kiel elspezanto de la mono. Se vi tion ne faros, neniu librotendisto helpos.

2.9. Raporto pri REJM

Raporto pri REJM mankas. K. Noviĉenko skribis, ke ne sukcesis pri restarigo de REJM.

Okazis diskuto pri REJM kaj pri la aĝo, ekde kiu homo povas esti membro de la organizo (partoprenis V. Sapoĵnikov, I. Gonĉarova, N. Cvileneva, N. Gudskov, V. Melnikov).

2.10. Raporto de komisiito pri dokumentado V. Aroloviĉ

V. Aroloviĉ ne partoprenas la Konferencon. La preparita de li raporto estis voĉlegita de A. Lebedev.

S. Smetanina aldonis, ke V. Aroloviĉ pretas plu daŭrigi tiun laboron.

3. *Raporto de la Kontrol-revizia Komisiono*

La prezidanto de la Komisiono **G. Basov** prezentas la raporton.

V. Melnikov: Necesas fiksi kaj montri ĉiujn enspezojn kaj elspezojn.

G. Basov: Fakte oni atendas iun financon helpon de REU, sed tio ne eblas.

N. Gudskov: Utilo de REU estas ricevo de la Bulteno.

I. Gonĉarova: Unue, REU estas bezonata ne por kunigi klubojn, ĝi devas esti reprezenta organizo. Tion REU plenumas. Due. Ni forigu kluban membrecon. Ja estas tempo ne de kolektivoj, sed de individuoj.

G. Basov: Mi komparis tion, kio venas de kolektivoj kaj de individuoj. Pli multe da mono tamen venas de kolektivoj.

4. *Debatoj pri la raportoj kaj pritakso*

Voĉdono: Akcepti la raportojn de la Estraro kaj pritaksi la laboron de la Estraro kontentiga.

por: 19, sindetenoj: 0, kontraŭ: 1.

Voĉdono: Akcepti raporton de la KRK

por: 18, sindetenoj: 1, kontraŭ: 1.

13:00 *Tagmanĝa paŭzo*

La dua kunveno (17.07.2019, 14:30)

Entute registriĝis 26 delegitoj. Ĉeestas 16 delegitoj.

5. *Konfirmo de regularoj*

Voĉdono: Konfirmi regularon pri Kondratjev

Por: ĉiuj.

Voĉdono: Aprobi la regularon pri Azia agado

Por: 14; sindetenas: 2.

Voĉdono: Aprobi la regularon pri Eminentia Instruisto

Por: 14; sindetenas: 2.

6. *Raportoj de kolektivoj*

Pri laboro de Samara Esperanto-klubo rakontis **Je. Kuznecova**.

Pri Tomska Esperanto-klubo rakontis **V. Minin**.

Pri situacio en MASI rakontis **I. Gonĉarova**.

Okazis diskuto pri nuntempaj kluboj:

V. Sapoĵnikov: Ne necesas vivi laŭ leĝoj de korporativa etiko. Tio estas ne esperantistaj leĝoj, ĉar esperantismo estas kolektiva agado. Neniaj kluboj mortas. Kiam homoj kolektiĝas kune, la efiko de kunagado plialtiĝas kelkoble.

S. Smetanina: Pravas ambaŭ. Tempoj ŝanĝiĝas, sed se forigi kluban membrecon, estus malfacile labori kun 200–250 individuoj.

I. Gonĉarova: REU devas plenumi reprezentan kaj informan funkcion.

V. Sapoĵnikov: Homj devas ekinteresiĝi, interesiĝi la aliajn ktp.

N. Gudskov: REU povas simili al gazeto. Kiu abonas gazeton — tiuj estas membroj.

V. Sapoĵnikov: Faru ni fonduson por subteni la informilon.

N. Gudskov: Ni ne bezonas monon, ni bezonas materialojn.

V. Sapoĵnikov: Tiam ni faru apartan abonon al la revuo.

7. *Elektado de la Prezidanto de REU*

N. Gudskov atentigis, unue, pri la Statuta regulo, ke la elekto devas esti alternativa, kaj, due, pri la postulo de la Ĝenerala Regularo, ke unu persono ne povas okupi prezidantan postenon dum pli ol 3 periodoj sinsekve. Nun estas la tria periodo de S. Smetanina.

Proponoj por la kandidatoj al la prezidanta posteno.

A. Lebedev proponis N. Gudskov.

I. Gonĉarova proponis A. Lebedev.

V. Melnikov proponis A. Mitin.

V. Cvetkova proponis V. Melnikov.

G. Basov proponis V. Sapoĵnikov.

S. Smetanina proponis Ju. Karcev.

N. Gudskov informis ankaŭ pri la eblo elekti S. Smetanina, se amendi la Ĝeneralan Regularon. Tiu ideo ne estis subtenita.

N. Gudskov ne konsentis esti prezidanto, pretas nur esti en la Estraro por okupiĝi pri eldonaĵoj, sed ne pri organizaj aferoj.

Al N. Gudskov estis proponita esti teknika prezidanto, sed la ĉefan organizan laboron faru S. Smetanina. Gudskov ne konsentis.

A. Lebedev ne konsentis balotiĝi, ĉar planas forveturi el Rusio por jaro dum proksima tempo.

A. Mitin konsentis balotiĝi.

V. Melnikov rifuzis, ĉar komprenas, ke landa asocio estas serioza afero, kaj ne volas partopreni spektaklon.

V. Sapoĵnikov rifuzis, ĉar la distanco estas granda, kaj li ne ŝatas gvidi distanco, kaj estas multe da laboro en Siberio.

Ju. Karcev rifuzis, ĉar ne sentas sin bona organizanto kaj ne spertas pri juraj aferoj.

Ĉar bezonatas minimume 2 kandidatoj, post diskutoj **A. Lebedev** konsentis esti formala kandidato.

Okazis sekreta voĉdonado pri la 2 kandidatoj:

1. Mitin

2. Lebedev

Rezultoj de la voĉdonado:

disdonitaj 22 bultenoj:

por Mitin — 9
por Lebedev — 12
ne validas — 1

Kiel Prezidanto de Rusia Esperantista Unio estis elektita **A. Lebedev**.

8. *Elekto de la vicprezidantoj*

Voĉdonado pri la kvanto de vicprezidantoj:

por unu vicprezidanto — 2
por du vicprezidantoj — 15
sin detenis — 3

A. Lebedev proponis S. Smetanina kaj N. Gudskov kiel vicprezidantojn.

V. Melnikov proponis A. Mitin kiel vicprezidanton.

Voĉdono pri la vicprezidantoj (oni rajtis voĉdoni dufoje, ĉar estis du lokoj).

Smetanina — 15
Gudskov — 13
Mitin — 4

Rezulte **S. Smetanina** kaj **N. Gudskov** estis elektitaj kiel vicprezidantoj.

9. *Elekto de la Estraro de REU*

Voĉdono pri la kvanto de estraranoj (**I. Gonĉarova** proponis 5, **V. Sapoĵnikov** proponis 7):

por 5 estraranoj — 4 voĉoj
por 7 estraranoj — 14 voĉoj

Kandidatoj:

A. Lebedev proponis A. Mitin.

S. Smetanina proponis I. Gonĉarova.

Aliaj kandidatoj rifuzis.

N. Gudskov: Ni ne povas trovi homojn por 2 direktoj (instru-metodika laboro kaj publikaj rilatoj). Do, ni povas lasi al la Estraro eblon koopti tiujn personojn, kiam ili troviĝos. Sed dume lasu ni 5 personojn.

J. Karcev: Sed, laŭ la Ĝenerala regularo, la Estraro dum oficperiodo rajtas koopti nur unu plian estraranon.

Voĉdono liste pri I. Gonĉarova kaj A. Mitin kiel estraranoj.

Por: ĉiuj, kontraŭ: 0, sin detenis: 0.

I. Gonĉarova kaj **A. Mitin** estas elektitaj kiel estraranoj.

10. *Elekto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU*

Estis proponitaj:

Gennadij Basov kiel prezidanto de KRK;

Larisa Ŝapoŝnikova;

Sergej Ĵilejkin.

La kandidatoj konsentas.

Voĉdonado liste:

ĉiuj por.

Do, estis elektita KRK en la konsisto: **G. Basov** (prezidanto), **L. Ŝapoŝnikova**, **S. Ĵilejkin**.

11. *Elekto de komisiitoj*

Komisiito pri dokumentado — **V. Aroloviĉ** (forestas, sed lia konsento estis anticipe ricevita): ĉiuj por.

12. *Elekto de A-komitatano, reprezentanta REU en la Komitato de UEA*

Estas proponita **S. Smetanina**.

Voĉdonado pri S. Smetanina kiel A-komitatano:

Por: 18, kontraŭ: 1, sin detenis: 0.

13. *Informoj pri planataj aranĝoj*

Je. Kuznecova rakontis pri planata blindula kongreso.

Oni rakontis pri RET-2020.

Voĉdonado: Aprobi proponon de krasnojarska klubo pri RET-2020:

Por: ĉiuj.

14. *Pri la nomo de Bulteno de REU*

N. Gudskov proponis renomi Bultenon de REU. Okazis diskuto. Estis decidita daŭrigi la diskuton dum la sekva kunveno.

La tria kunveno (18.07.2019, 19:10)

Ĉeestas 18 personoj.

15. *Raporto pri la unua kunsido de nova Estraro*

N. Gudskov legas protokolon de la unua kusido de la nova Estraro.

I. Dum la unua kunsido la Estraro disdividis la taskojn kaj labordirektojn inter la estraranoj:

- 1) A. Lebedev (prezidanto) — ĝenerala gvidado, administraj aferoj, zorgoj pri la retejo, ĝenerala zorgo pri la kaso;
 - 2) S. Smetanina (la unua vicprezidanto) — administraj aferoj dum foresto de la prezidanto, instru-metodika laboro, ekzamenoj, eksteraj rilatoj, landaj aranĝoj;
 - 3) N. Gudskov (la dua vicprezidanto) — aperigo de informiloj kaj aliaj eldonoj de REU, landaj aranĝoj;
 - 4) I. Gončarova (estrarano) — regiona agado, informoj pri instruado, ekzamenoj, populariga laboro;
 - 5) A. Mitin (estrarano) — zorgoj pri la membraro, retejo, grupoj en sociaj retoj, dissendolistoj, kontaktoj kun vikipedistoj.
- Noto: la Estraro rajtas koopti plian estraranon.

II. Krome, la Estraro preparis projekton de la Decidoj de la Konferenco, kiu estos prezentita poste, fine de la Konferenco.

16. *Diskuto pri moderigado de la dissendolistoj REU-agado kaj Esperanto-rus-informoj*

Voĉdonado: peti A. Osokin igi A. Mitin administranto de la listoj «REU-agado» kaj «Esperanto-rus-informoj» kun maksimumaj rajtoj.

Por — ĉiuj unuanime.

17. *Renomo de Bulteno de REU (daŭrigo de la diskuto)*

I. Gončarova: Mi ne ŝatus, ke en la titolo estu «REU». Tiu gazeto devas esti por la tuta esperantistaro de Rusio. Por ĝi ne aspektu kiel interna dokumentaro de REU.

V. Melnikov: Gravus tradicio kaj akirita renomo, do eblas preni nomon «Rusia Esperanto-gazeto». Eventuale demandi permeson de G. Kokolija.

J. Karcev: Indas lasi la nomon «Bulteno de REU».

N. Gudskov: «Bulteno de REU» estu en la kolofono. En la nomo necesas montri la landon, ja ĝi estas landa gazeto.

V. Melnikov: Eblas preni nomon «Aktuale».

S. Smetanina: Ni lasu tiun demandon.

La decido ne estas akceptita.

18. *Optimumigo de la kotizoj*

G. Basov: Bezonatas buĝeta politiko, por ne proponi la kotizon «de plafono».

N. Gudskov: KRK formulu konkretajn proponon pri tio.

I. Gončarova: Kaj necesas konsideri proponon likvidi kolektivan membrecon.

G. Basov: Praktiko montras, ke plejparto de la mono venas de kolektivaj kotizoj.

V. Sapoĵnikov: Necesas interesigi klubojn pagi por pli multe da homoj.

A. Lebedev: Estas interese, se ni likvidos kluban membrecon, ĉu ĉiuj tiuj homoj, kiuj estis aligitaj membroj, re-aligis individue?

V. Sapoĵnikov: Eĉ ne pensu pri likvido de kluba membreco!

N. Gudskov: Propono likvidi kolektivan membrecon estas ne matura.

I. Gončarova: Ni revenu al tiu ideo post iom da tempo.

19. *Proponoj de A. Mitin*

Estas decidita aktivigi diskuton pri la proponoj de A. Mitin.

20. *Librotenado en REU (propono de G. Basov)*

La temo jam estis pridiskutita en kadre de raportoj.

21. *Financa planado kaj buĝetado de REU*

La temo jam estis pridiskutita en kadre de raportoj.

22. *Pri ILEI-sekcio aŭ komisiono*

La temo estis proponita de V. Opletajev. Li verkis noticon pri tio (la notico lebeblas en la broŝuro «Materialoj por la 30-a Konferenco de REU»).

Pri tio okupiĝos I. Gončarova kaj S. Smetanina en labora ordo.

23. *Propono de I. Muravjov*

I. Muravjov: Necesas plibonigi retkonekton dum renkontiĝoj. En modernaj konferencoj (ekzemple, profesiaj) oni filmas kunvenojn kaj liveras la videon per interreto en reala tempo. Videoj povas esti pagataj.

Do, **la propono:** organizantoj kontrolu, ĉu estas interreto, kaj sciigu pri tio partoprenontojn anticipe.

La konkretigo: kiam organizantoj esploras bazejon por iu aranĝo ili devas ne simple kontentiĝi per promesoj de la bazejo, sed ankaŭ memstare surloke provi ViFi-on, atente mezuri la rapidecon de ĝi per ajna aplikaĵo (tiucelaj aplikaĵoj multas, ekzemple, «Speedtest»), prefere en diversaj partoj de la bazejo. La konkretan valoron de la rapideco de la interreto necesas noti en informleteroj pri aranĝo, por ke partoprenontoj sciuj, je kio eblas esperi.

Decido: konsideri tion dum estontaj aranĝoj.

24. *Reprezentantoj de REU en regionoj*

I. Gončarova informis, ke **Jelena Kuznecova** konsentis esti reprezentanto de REU en Volgio.

25. *Pri REU en sociaj retoj*

Necesas reprezenti REU en sociaj retoj, ekzemple Facebook kaj Instagram.

26. *Akcepto de la Decidoj de la Konferenco*

A. Lebedev voĉlegis la projekton de la Decidoj.

Voĉdonado pri akcepto de la Decidoj:

Por: 20, kontraŭ: 1, sin detenis: 0.

Noto: entute al la Konferenco aliĝis 26 delegitoj

La Konferenco estas fermita.

Protokolis Jurij Karcev kaj Nina Cvileneva

Protokolo № 1 de la Estrara kunveno

Loko/dato: setlejo Carina Lago (Tiĥvina distrikto), 18.07.2019

Ĉeestis estraranoj:

Aleksandr Lebedev (Dolgoprudnij) — prezidanto, Svetlana Smetanina (Moskvo) — la unua vicprezidanto, Nikolaj Gudskov (Moskvo) — la dua vicprezidanto, Irina Gončarova (Odincovo). Distance per skajpo partoprenis Aleksandr Mitin (Niĥnij Novgorod).

Temo:

Disdivido de taskoj kaj laborkampoj/labordirektoj inter la membroj de la Estraro, elektita de la 30-a Konferenco de REU.

Preparo de projekto de la Decidoj de la Konferenco.

Decidoj:

Komisii al la estraranoj en la dujara ofica periodo 2019–2021 plenumadon de la jenaj taskoj kaj labordirektoj:

- 1) A. Lebedev (prezidanto) — ĝenerala gvidado, administraj aferoj, zorgoj pri la retejo, ĝenerala zorgo pri la kaso;
- 2) S. Smetanina (la unua vicprezidanto) — administraj aferoj dum foresto de la prezidanto, instru-metodika laboro, ekzamenoj, eksteraj rilatoj, landaj aranĝoj;
- 3) N. Gudskov (la dua vicprezidanto) — aperigo de informiloj kaj aliaj eldonoj de REU, landaj aranĝoj;
- 4) I. Gončarova (estrarano) — regiona agado, informoj pri instruado, ekzamenoj, populariga laboro;
- 5) A. Mitin (estrarano) — zorgoj pri la membraro, retejo, grupoj en sociaj retoj, dissendolistoj, kontaktoj kun vikipedistoj.

Noto: la Estraro rajtas koopti plian estraranon.

Cetero:

Estis preparita projekto de la Decidoj de la Konferenco. La projekto estos prezentita por akcepto fare de la Konferenco fine de la lasta kunveno de la Konferenco.

Prezidanto de REU: A. Lebedev

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov

Sekretario de la kunveno: N. Gudskov

Nova Prezidanto de REU sin prezentas

10 demandoj al Aleksandr Lebedev

Dum la 30-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio (17. julio 2019, Tiĥvino, Leningrada provinco) Aleksandr Lebedev estis elektita nova Prezidanto de REU. Malgraŭ sia juna aĝo Aleksandr posedas jam spertojn de estrarano, sed nun li devas alfronti faskon da problemoj kaj seriozaj taskoj kiel gvidanto de la Estrara teamo kaj atingi la nivelon de multe pli granda respondeco antaŭ la membraro de REU. Ĉiuj amikoj, membroj de REU deziras al la novelektita gvidanto de REU sufiĉan energion por la dujara oficperiodo, novajn ideojn, multajn sukcesojn en ĉiuj iniciatoj kaj fruktodonan agadon. Aleksandr afable respondis al niaj demandoj, kaj vi povas informiĝi nun pri pluraj liaj opinioj, vidpunktoj, ideoj, ligitaj kun la landa esperantista movado.

Vladimir Opletajev

1) Kial kaj kiel vi esperantistiĝis? Homoj venas al Esperanto pro plej diversaj ideoj, sed kio estas por vi Esperanto? Kio estas vi? Kio estas viaj hobiaj? Ĉu viaj profesiaj spertoj helpas vin realigi projektojn ankaŭ en la esperantista komunumo?

Mi eksciis pri Esperanto en la aĝo de mezlernejano. Dum lastaj jaroj de la studado en mezlernejo kaj poste dum la institutaj jaroj mi faris almenaŭ du provojn aŭtodidakte lerni la lingvon. Bedaŭrinde, ambaŭ ili estingiĝis, mi preterlasis do la ŝancon veni en Esperantujon multe pli frue ol tio efektive okazis en mia vivo.

Iom pli ol jaron post la finstudo en la instituto mi denove eklernis Esperanton. Kelkajn monatojn tio estis memstara lernado, kaj en la



jaro 2013 mi konatiĝis kun Irina Gončarova kaj finis ŝian Esperanto-kurson «FaRo». Tiun ĉi momenton mi konsideras mia esperantistiĝo — do, la jaro 2013.

Ĉar mia unua konatiĝo kun Esperanto estis tre antaŭlonge, mi ne tute klare memoras la unuajn motivojn. Ŝajnas, ke allogis la ideo de justa komunikilo inter diverslingvuloj. Al tio certe aldoniĝis kaj simpla intereso, kaj malbonaj rilatoj kun la devige studata en lernejo angla.

Nun Esperanto estas por mi unuavice la komunumo kaj aranĝoj. Tamen, ankaŭ la ideo de la justa komunikilo daŭre gravas.

Mi estas programisto, loĝanta nun apud Moskvo. La konstanta hobbio en la senco «kion mi faras ekster la laboro» estas Esperanto. Aliaj ŝatokupoj ŝanĝiĝadis dum tempo. Iam mi aktive rulsketis, foje partoprenis turismajn piedmarŝojn, lastajn jarojn mi gitarludas.

La profesian sperton mi uzas nun por subtenado kaj refarado de la REU-paĝaro, pri sukceso de tio dume fruas juĝi, la laboro daŭras.

2) *La pasintan Estraran oficperiodon de REU vi pasigis kiel estrarano. Kiujn spertojn vi akiris ne nur pri la gvidado de la tutlanda organizaĵo sed ankaŭ pri rutinaj burokrataj aferoj kaj taskoj ĉiutage plenumendaj, tio estas tiuj taskoj, kiujn ordinaraj membroj eĉ ne imagas al si?*

Pri gvidado mi ne ricevis spertojn. Pri rutinaj burokrataj aferoj — jes, estas taskoj kolekti kotizojn, noti enspezojn, fari raportojn pri tio. Sufiĉe enuaj aferoj, kiujn tamen iu devas fari.

3) *Kiel estrarano vi faris multon utilan kaj necesan en la preparperiodo por okazigi la 30-an Konferencon de REU. La Statuto de REU difinas la Konferencon ĝia supera gvidorgano. Kiel vi povas taksu la rezultojn de la lasta Konferenco kaj ĝiajn decidojn?*

Plejparte la decidoj estis antaŭvidataj. Surprizis min nur mia neatendita elekto. Estis prezentitaj raportoj de la Estraro kaj Kontrol-revizia Komisiono, ne perfektaj, sed multe pli taŭgaj ol tiuj por la antaŭa Konferenco. Sed la kvanto de delegitoj de la Konferenco malpliĝis kompare kun la antaŭa fojo. Aparte aflikta nepartopreno de membroj, kiuj venis al TEMoj el malproksimaj lokoj, sed anstataŭ uzi ŝancon partopreni la Konferencon, havis aliajn preferojn.

4) *Unu el la gravaj mankoj de pluraj antaŭaj Estraroj estis ilia enfermiteco, nesufiĉo de informado pri laborplanoj, agaddirektoj, ĝustatempaj raportoj kaj tiel plu. La lasta Estrara kolektivo rimarkeble pozitive ŝanĝis la bildon, sed multaj problemoj ankoraŭ restas. Kiujn ideojn vi havas pri ĉi tiu temo?*

Dume mi havas ideon daŭrigi la raportadon, kiun pli-malpli faris la lasta Estraro, kaj provi aldoni al tio verkon de koncizaj laborplanoj.

5) *Kiun koncepton vi posedas nun pri REU? Kio estas ĝi laŭ via opinio? Kritikantoj de REU persiste asertas, ke kvazaŭ la rolo de la tutlanda organizaĵo ĉiam pli ŝrumpus, dum faktoj realaj atestas ofte aliajn tendencojn. Evidente la malsamajn opiniojn kaŭzas malsamaj konceptoj pri REU kiel tutrusia socia unuiĝo de esperantistoj.*

Por mi REU estas grava simbola atestilo de unueco de la rusia esperantistaro, sen kiu ĝi estus dispecigita je neligitaj homoj kaj kluboj, sendepende de amikecaj rilatoj inter tiuj.

El ne simbolaj, sed praktikaj rezultoj de la agado de REU la plej sukcesaj estas regula okazigo de la landa aranĝo RET (Rusiaj Esperanto-tagoj) kaj produktado de la landaj revuoj «Bulteno de REU» (kiu, eble, ekhavas novan titolon) kaj «Cerbe kaj kore».

6) *Iuj movadaj aktivuloj, spertaj esperantistoj rifuzas aliĝi al REU sub formala preteksto ne konsenti kun ĝiaj oficialaj statutaj celoj. Ĉu vere la agadceloj de REU estingas la elanon de ĝiaj individuaj kaj kolektivaj membroj, limigas aktivadon de esperantistoj kaj baras vojojn al ilia persona evoluo?*

Mi ĵus relegis la statutajn artikolojn pri la celoj kaj taskoj kaj trovis en ili nenion kontraŭan al ajna averaĝa esperantisto nek des pli al movade aktiva homo.

7) *Vi partoprenas multajn esperantistajn regionajn renkontiĝojn kaj aranĝojn en Rusio, kaj ne el fremdaj buŝoj vi estas bone informita pri la reala situacio de la regionaj movadoj en la lando. Kion vi opinias pri la tuta spektro de atingoj kaj ankaŭ de problemoj, kiujn alfrontas regionaj movadaj aktivuloj?*

Se listigi Esperante aktivajn lokojn sur la mapo de Rusio kaj rememori, kio okazas en ĉiu el ili, rezultos ampleksa listo de atingoj. Jen de tie oni regule sendadas literaturajn kontribuojn al «Cerbe kaj kore», tie oni konstante elpaŝas por ekstera publiko, tie oni havas perfektan klubojn kaj modelan kluban vivon kun regulaj kunvenoj, tie oni generas multajn retajn projektojn, tie puŝadas ŝtonegon de unu granda projekto, en multaj lokoj oni faras kursojn... Fakte, regionaj movadoj ekzistas ĉie, kie estas regionaj aktivuloj, kiuj emas kaj scipovas gvidi. La ĉefa komuna problemo estas, ke tiaspecaj aktivuloj malmultas kaj ne junas. Kaj alispecaj sen ili ne formas regionajn esperantistajn komunumojn, eĉ se mem individue estas bonaj esperantistoj.

8) *La realaj faktoj, ankaŭ statistikoj pri partoprenantoj de landaj esperantistaj programoj kaj aranĝoj aflikte konstatas kaj prognozas ĉiam pli kaj pli rimarkeblan maljuniĝadon de la esperantista movado en Rusio. Unuflanke temas pri ekzistanta larĝa tavolo de sperta Esperanto-parolantaro, sed aliflanke jam sentebblas manko de ĝejnuloj en la komunumo. Kion la Estraro planas entrepreni por almenaŭ pli insiste atentigi pri la problemo, daŭrigante la spertojn de ĉi-rilata AMo-seminario-2018?*

Normale «freŝajn fortojn» devas doni Esperanto-kursoj. Sed el tiuj, kiuj finis bazajn Esperantajn kursojn, daŭrigas evoluigon de siaj lingvokonoj malmultaj. Plejparte oni komence restas je baza nivelo sen vera integriĝo en la komunumon kaj poste perdas ankaŭ tiun bazan nivelon. Esperanto kiel ajna lingvo postulas tempon kaj fortojn por ekposedi ĝin ĝis tiu grado, je kiu plia investado en la senco de lernado ne bezonatas, kaj oni povos diri «mi jam ne lernas, mi uzas». Tiu tempo por averaĝaj homoj estas monatoj, sed ne semajnoj. Ŝajnas, ke novuloj plejparte ne trairas ĉi tiun vojon kaj forfalas. Aŭ restas «eternaj komencantoj». Bedaŭrinde, mi ne scias, kiel venki tiun ĉi tendencon.

9) *El la plenplena korbo de diversaj celoj, taskoj, urĝaj farendadoj la Estraro elektos por la nova ĵurara oficperiodo prioritatajn labordirektojn. Kiujn prioritatojn vi povas proponi al la Estraro respektive al la membraro de REU, memkompreneble donante atenton al la bazaj Statutaj celoj de la organizaĵo?*

Necesos bone organizi RET-2020, subteni morale kaj informe organizon de aliaj aranĝoj. Indas iel engaĝi en la laboron homojn el ekster la Estraro kaj oficialaj postenoj, laŭ volontula modelo (sed kiel tion fari mi dume tute ne imagas).

10) *Ruĝa limlinio por elektitaj ŝtatestroj kaj prezidentoj estas unuaj 100 tagoj post ilia enoficiĝo. Kiujn taskojn por la Estraro vi konsideras plej urĝe realigendaj ĝis la jarŝanĝo?*

La plej proksimaj taskoj rilatas al ordigo kaj publikigo de la rezultoj de la Konferenco: la protokolo, decidoj, unua(j) protokolo(j), kio devas aperi en la sekva «Bulteno de REU». Kelkaj taskoj rekte sekvas el la decidoj de la Konferenco: aktualigi la liston de dumvivaj membroj, verki Regularon pri Esperantisto de la jaro, nomumi Esperantiston de la jaro 2019, verki laborplanojn. Necesos decidi pri aliĝkoto por RET-2020 kaj malfermi registriĝon por ĝi. Krome, necesas provi fari planon de elspezoj por la sekva jaro kaj okulmezuri: ĉu la nunaj kotizoj sufiĉas por ilin kovri? En mia kampo indus fini la unuan etapon de refarado de la paĝaro.

Mi gratulas ĉiujn okaze de la Tago de Esperanto, deziras energion kaj kreemon, alvokas kontribui la regionan, landan, internacian agadon!

Afiŝita de Vost je Ĵaŭ, 2019-07-25 22:52.

<https://ural-sib.org/eo/10-demandoj-al-aleksandr-lebedev>

Raporto pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» 16.12.2018–21.07.2019

Dum la periodo 16.12.2018–21.07.2019 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 1250 rubloj.

Listo de la kontribuintoj:

- Kitajkin Ivan (Turgenevo, Mordovio);
- Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangelsk).

Sume: 1250 P.

La kolektita mono estis transdonita al Kondratjev-teamo.



Karaj amikoj!

Bonvolu atenti la premiojn, ricevatajn en poezia branĉo!

Ĉiun premiojn (nome, la duan kaj trian, konsiderante ke la unua ne estis aljuĝita) ricevis Evgenij Georgiev (Espopore), plus homoran mencion ricevis Tatjana Auderskaja.

Ili estas konstantaj kontribuantoj de nia kultura eldonaĵo "Cerbe kaj Kore", kiuj konstante plibeligas ĝian enhavon. Kaj, kiel eblas supozi, la publikajoj en nia modesta revueto ankaŭ kontribuas kreskon de ilia artistika nivelo kaj eblecon ricevi la premiojn!

Gratulojn, karaj geamikoj, kaj pliajn sukcesojn en la nobla tereno de la esperantlingva originala poezio!

Niaj poetoj premiitaj

Estraro de REU

PREMIITOJ DE LA 70-A ELDONO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Okazis ĉi-ĵaŭdon, la 25-an de julio, en Salono Lapenna kadre de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando, la premisdono de la 70-aj Belartaj Konkursoj de UEA. Sub gvidado de S-ro Miguel Fernández Martín kaj S-ro Miguel Gutiérrez Adúriz, respektive prezidanto kaj sekretario de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj, **ĉi-jara eldono rekordis** pri la nombro de partoprenintaj literaturaj verkoj, kun entute **171 verkoj el la 5 kontinentoj**: Oceanio, Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

La rezulto estas jena:

BRANĈO PROZO: partoprenis 31 verkoj de 22 aŭtoroj el 15 landoj (3 el Azio, 2 el Ameriko, 10 el Eŭropo).

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Tria premio: en egaleco al la verkoj "Fanjo", de Ewa Grochowska el Francio, kaj "La plej granda tragedio", de Ariel Bonkorpa el Britio.

Dua premio: al la verko "Venko de tempo", de Christopher Lewis el Britio.

Unua premio: al la verko "La blua arbaro", de Jesper Lykke Jacobsen el Francio.

SUBBRANĈO MIKRONOVELO: partoprenis 49 verkoj de 30 aŭtoroj el 19 landoj (2 el Oceanio, 6 el Azio, 16 el Ameriko, 25 el Eŭropo).

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Unua premio, premio Paula Adúriz: al la verko "Verŝajne", de Christian Rivière el Francio.

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn:

"Ŝafoj", de Edmund Grimley el Britio, kaj "Teror-rakonto", de Paulo Sergio Viana el Brazilo.

Jen la premiita verko:

Verŝajne

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletigis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro mia patro maltrafis la starton de alloga krosado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memproĉoj en la okuloj li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, n i v e r ŝ a j n e e s t u s n a s k i t a j .

BRANĈO TEATRAĴO: partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

Juĝkomisiono: Wera Blanke, Serĝo Sir', Giuliano Turone.

Tria premio: al la verko "Tutkorajn bondezirojn malŝlosajn", de Grupo de Esperantistoj de Francilio 2018-2019 el Francio.

La dua premio kaj la unua premio ne estis aljuĝitaj.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO: partoprenis 6 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

Juĝkomisiono: Wera Blanke, Serĝo Sir', Giuliano Turone.

Unua premio, premio María Cuevas: al la verko "Maldikigi vortaregojn!", de Roman Dobrzyński el Pollando.

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn:

"Konfeso de murdunto", de Asocio Esperanto-Grenoble el Francio, kaj "La tuta mondo estas teatro", de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

BRANĈO ESEO: partoprenis 9 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj.
natuĴĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Dua premio: al la eseo "Stereotipaj komparoj en Esperanto", verkita de Suso Moinhos el Hispanio.

Unua premio, premio Luigi Minnaja: al la eseo "Kodado en 'La kato en la sako'", verkita ankaŭ de Suso Moinhos el Hispanio.

INFANLIBRO DE LA JARO: partoprenis 5 infanlibroj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Ricardo Albert Reyna, James Rezende Piton

La premio ne estis aljuĝita.

BRANĈO POEZIO: Partoprenis 67 verkoj de 35 aŭtoroj el 22 landoj (12 el Azio, 1 el Afriko, 17 el Ameriko, 34 el Eŭropo).

Juĝkomisiono: Krys Williams, Jak Le Puil, István Ertl.

Honoraj mencioj: al la poemoj "Knabo dum rifuĝado", de Yida Wei (Veĵdo) el Ĉinio, kaj "Revoluciulo", de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

Tria premio: al la poemo "Tor fiŝkaptas", de Evgenij Georgiev el Kazahio.

Dua premio: al la poemo "Terra Incognita", de Evgenij Georgiev el Kazahio.

La unua premio ne estis aljuĝita.

Kunordigis la disdonon Fernando Maia Jr., Sara Spanó kaj Michela Lipari.

UEA gratulas la premiitojn kaj ĉiujn partoprenintojn kaj kore dankas la Komisionon pri Belartaj Konkursoj kaj la juĝantojn pro la giganta laboro. Ĝis la 71-a eldono!

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 813, 2019-07-25

UK rezolucias



REZOLUCIO de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lahtio de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019, kun 917 partoprenintoj el 57 landoj, traktinte la kongresan temon "Vivanta naturo – floranta kulturo", en tri kongrestemaj sesioj, pluraj prelegoj, kaj diversaj aliaj kunvenoj kaj ekskursoj en la regiono de Lahtio; notante la kongruecon de la temo kun la lastatempa nomumo de Lahtio kiel Verda Ĉefurbo de Eŭropo por 2021; substrekte la ligitcon de la temo kun la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la jaro 2019;

deklaras, ke daŭripova naturo akompanas daŭripovan socion kaj daŭripova socio akompanas egalecan pritrakton de la homoj, ankaŭ rilate lingvon;

avertas, ke la nunaj procezoj de ekonomia tutmondiĝo egale minacas la daŭripovon de kultura diverseco kaj biologia diverseco;

substrekas, ke la Esperanto-movado, kiel movado por alispeca tutmondiĝo bazita sur respekto kaj valorigo de lingva kaj kultura diverseco, estas samtempe movado por daŭripova evoluigo en vasta senco;

atentigas, ke multaj individuoj kaj organizoj en la Esperanto-movado jam aktive laboras por pli ekvilibraj rilatoj inter naturo kaj kulturo, interalie agadoj por interkultura edukado, interhoma solidareco, kaj subteno al lokaj iniciatoj por daŭripova evoluigo; kaj

alvokas por interprokimiĝo kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj aliaj organizoj kaj movadoj por la protektado kaj evoluigo de lokaj kulturoj kaj naturmedioj en monda skalo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 814

2019-07-26

Invito al venontaj rusiaj aranĝoj



VER-16

Volgia Esperanto-renkontiĝo

2019-11-02/04

Bonvenon al Samara!

Ĉu antaŭlonge vi vizitis Volgion?

Ĉi-aŭtune samaraj esperantistoj denove invitas ĉiujn dezirantojn, sendepende de loĝloko, al la bordoj de nia ŝatata rivero por gaje kaj utile pasigi novembrajn ripoztagojn dum **VER-16** (Volgia Esperanto-renkontiĝo). Vi povos ekscii multe da interesaj faktoj pri volgaj regionoj lige kun Esperanto, renkonti malnovajn kaj konatiĝi kun novaj amikoj, partopreni en Samara muzea nokto kaj, certe, praktiki Esperanton.

Vin atendas nekutima por Esperanto-aranĝoj loko. Ni proponas loĝi, kunsidi, ludi kaj kanti en urba hostelo (hoteleto) kun prezoj por loĝado ekde 400 ₺/nokto en ĉambro kun duetaĝaj litoj ĝis 800 ₺/nokto en ĉambro kun ordinaraj litoj kaj oportunaĵoj enĉambre. Manĝi eblos en apuda manĝejo.

Elektado de la plej taŭga hostelo dependas de partoprenintoj. Ni petas sendi respondojn «jes» aŭ «ne» por tri demandoj al la adreso: espersam@yandex.ru:

- Ĉu vi havas deziron kaj eblon veni al Samara por **la 2-a – 4-a de novembro 2019**?

- Ĉu vi konsentas dormi sur duetaĝa lito?

- Ĉu vi supreniros al la kvara etaĝo sen lifto?

Ĝis la renkonto dum **VER-16**!

Novojarsk-2020

Novjara Esperanto-renkontiĝo

2019-12-31/2020-01-05

Jarŝanĝa renkontiĝo Novojarsk 31.12.2019–05.01.2020

Ĉi-foje ni renkontos Novan Jaron en Barnaulo!

Se vi ne volas enui hejme dum longaj vintraj ferioj, bonvenon al la renkontiĝo Novojarsk-2020!

Jam tradicia siberia Novjara renkontiĝo invitas vin!

Ĉiujn informojn kaj kontaktojn de la organizantoj vi trovos en la paĝo <https://vk.com/novojarsk2020>.



RET-2020



Rusia Esperantista Unio



Krasnojarska esperantista klubo
ESPERANTO

Svetlana Smetanina: svsmetanina@yandex.ru
Krasnojarska Esperantista klubo:
kresko1975@mail.ru

RUSIAJ ESPERANTO- TAGOJ

“Siberio invitas vin!”

**10-19 de Julio
2020**



Flosado laŭ rivero Mana

2020: KRESKO — 45-jara!



Promenoj kaj ekskursoj

Riĉa kultura programo

BONVENU!

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj)
Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 08.08.2019